



Enhavtabelo	Paĝoj
En nia rubriko pri libroj ni elektis prezenti al vi la unuan libron de la itala verkisto Gian Marco Griffi. Vidu ĉi apude.	1 2 3
Hodiaŭ preskaŭ ĉiu el ni havas sian komputilon. Kaj multaj aplikoj ekzistas sed tiu, pri kiu temas en tiu novelo ankoraŭ ne estas inventita...	3 4 5
Se vi neniam feris en la atlantikaj pireneoj, eble vi neniam aŭdis pri la insulo de la Fazanoj. Tiam legu la artikolon, kiu estas dediĉita al ĝi.	5 6
La kanabo, kies aplikoj estas multaj, estas la temo de tiu paĝo.	7
Recepto :Fagopiraj blinoj kun spinacoj	8

RELA KULTURO <LIBRO>

Fervojoj de Meksikio. Absurda serĉado de fervoja mapo.

La unua romano de Gian Marco Griffi estas majstraĵo. Tiu pikareska rakonto esprimas la tutan absurdecon de la milito kaj de la militista oficistaro ĉirkaŭ simpla ordono : desegni la mapon de la fervoja reto de Meksikio.

Elirinte en marto 2024 ĉe la Gallimard eldonentreveno, la romano *Fervojoj de Meksikio* de la itala verkisto Gian Marco Griffi enscenigas la malsukcesojn de simpla membro de la nacia respublika fervoja gvardio de la urbeto Asti, norde de Italio, sklavigita de ordono, kiun li ne povas ignori. Tiu rakonto okazas dum historia precizega periodo. Ĝi enprofundigas nin en la groteskan realon de la socia itala Respubliko, la dua faŝisma itala reĝimo, starigita de la nazioj. La germana armeo okupas tiam la nordan Italion por kontraŭi la antaŭeniron de la alianciĝintaj trupoj elŝipiĝintaj en Sicilion en julio 1943. La alveno de la Usonanoj kaŭzas la malvenkon de Mussolini, kiu estas enkarcerigita. Italio, tiam reprezentita de la reĝa familio, deponis la armilojn kaj petis armisticon. Ĝi eĉ deklaras la militon al Germanio en oktobro 1943. Sed Mussolini estas liberigita de germana ataktaĉmento estrata de aŭstra SS kapitano, Otto Skorzeny. La Duĉo (Duce) kreas tiam la Socian Italian Respublikon sur teritorio entenanta parton de norda kaj centra Italio. Ties ĉefurbo stariĝas en Salo, sur la bordoj de Garda-Lago. La Nazioj estas tiam la veraj

mastroj de la lando de tiu marioneta Ŝtato.

Iam Adolf Hitler aŭdas pri nova armilo, kiu povus ŝanĝi la evoluon de la milito. « Subjektiva » armilo, kiu troviĝus proksime de fervoja relforko sur perdita terpeco de Meksikio. La diktatoro ordonas, ke oni eltrovu tiun armilon kaj precize determinu, kie troviĝas la koncernata relforko. Sed la ordono vojaĝos tra la tuta hierarkio de la nazia Ŝtato, poste tiu de la « Respubliko de Salo » ĝis la urbeto Asti. Al simpla membro de la nacia respublika fervoja Gvardio, Francesco Magetti, alnomata « Cesco », komisiis lia estro, ke li desegnu mapon de la meksikia fervoja reto. Lia ĉefadjudanto klarigas al li : « *Mi diras, ke mi ne havas la plej malgrandan ideon pri la kaŭzo, kial vi devas redakti dokumenton pri la meksikiaj fervojoj. Mi ricevas ordonojn de iu, kiu ricevis ordonojn de iu, kiu antaŭ si ricevis ordonojn de iu alia, kiu ricevis ordonojn. Eble estas iu supre, kiu konas la kaŭzon, kial estas nepre vitale redakti dokumenton pri la meksikiaj fervojoj... La bruo diskoniĝis ĝis la oreloj de la Führer (gvidanto) aŭ la oreloj de Goebbels, kiu dekretis, ke posedi detalan planon de la meksikiaj fervojoj por la Reich (Imperio) kaj ties aliancanoj, estas afero pri vivo kaj morto.* »

Daŭre senfortigata de denta dolorego, la juna faŝisma soldato entreprenas serĉadon por eltrovi la verkon kaj sukcesi plenumi sian mision. Cele al kolektado de kelkaj informoj pri la trajnoj de tiu fora lando, li iras al la biblioteko, kie li tuj enamiĝas al la bela Tilde, kiu tie laboras. Tiu ĉi informas lin, ke la nura libro de la kolekto traktanta la temon, kiu interesas lin, estas nuntempe pruntedonita. Temas pri la « Historia poética y pitoresca de los ferrocarriles en México », skribita en la hispana lingvo de iu Gustavo Paz. La germana versio ekzistis sed bedaŭrinde suferis pro la aŭtodafeo en Berlino en Junio 1943 sekve de la fervora laboro de la nazia oficistaro... Rezultas, por kontentigi la peton de Hitlero, ke la kompatinda Cesco devas nepre trovi la altvaloran verkon, pri kio nenio diras, ke ĝi ebligas streki mapon de la meksikia fervoja reto. Lia enketo kondukas lin al la tombejo de San Rocco, kie laboras du misteraj enterigistoj, kiuj laŭ Tilde verŝajne estas la lastaj, kiuj prunteprenis la libron. La unua, « Mec », neniam malfermas la buŝon. La dua, « Lito », konstante malfermas ĝin. La du viroj foriris en centran Amerikon por labori sur la fervojaj konstruejoj de malsamaj landoj : « *oni metis relojn inter Concepcion de Maria kaj*

Anunciacion de Magdalena, ĉe la landlimo inter Nikaragvo kaj Honduraso. Oni estis dirinta al la loĝantoj, ke la fervojo ebligas sociajn interŝanĝojn inter la du vilaĝoj. Tio ridigas min ankoraŭ hodiaŭ. Homoj de Anunciacion de Magdalena neniam havis la ideon iri al Concepcion de Maria, kaj tiuj de Concepcion de Maria neniam havis la ideon iri al Anunciacion de Magdalena. Homoj de



GIAN MARCO GRIFFI

Concepcion de Maria preferintus dispecigi sian propran patrinon ol vidi iun el Anunciacion de Magdalena alveni en sian vilaĝon . »

Iliaj atestoj kondukas nin precipe en Meksikion, dum la milito de la Cristeros. Tie ili renkontis Gustavo Paz, la aŭtoron de la tiom serĉata libron Sed la rakonto de Lito konsistas el ĉirkaŭparoloj kaj mallaŭtaj konversacioj... Tiel ke la informoj utilaj al la starigo de fervoja mapo restas ege parcelaj...

Cesco ekscias nenion precizan... La leganto iom pli... Parto de la eventoj estas diskonigita al li de la raportoj de la multaj denuncoj kolektitaj de la agentoj de la Gestapo-komandejo de la taĉmento de Asti. Honestaj civitanoj, fidelaj al la faŝisma ordono aŭ motivitaj de la aĉetebleco, detalas tiel al la nazia politika polico la suspektindan konduton de la juna soldato.


Antaŭ tiu unua romano, Gian Marco Griffi, kiu estras golfirvojon en Piemonto, estis publikiginta kelkajn novelojn, kies du el ili estis rearanĝitaj kaj integritaj al « *Fervojoj de Meksikio* ». Laŭ la konfeso de li mem, tio estas la kronvira krizo kaj

la izoliĝo en la hejmo, kiuj ebligis al li disvolvi tiun « *aventuran romanon* » de granda originaleco. En ĝi, ĉiu ricevas sian parton de kulpigo. Ĉiaj militistoj evidente, sed ankaŭ rezistantoj, burĝoj, kamparanoj, faŝistoj, nazioj, komunistoj...

Cesco Magetti aldoniĝas al la longa tradicio de la soldato fronte al la absurdeco de la milita aĵo. Estas ĉe li parto de la brava soldato Chvéik, la fama figuro inventita de la ĉeĥa verkisto Jaroslav Hasek. Estas ankaŭ parto de la komandanto Giovanni Drogo de Dino Buzzati, revenante de sia kastelo superanta la dezerton de la Tataroj al vivo, kiu nun ne plu apartenas al li. Cesco estas samtempe en la povo de la Historio kaj ties motoro, li trapasas la militon sen kompreni ion, luktante nur por ne esti detruata. Turmentata de la doloro de kario, kiu konstante suferigas lin, li eltenas... Ĝis kiam ?

Tiun recenzon de Samuel DELZIANI aperintan en La Vie du Rail de la 7a de junio 2024 tradukis Jean-Mary Simonet

Chemins de fer du Mexique – Aventura romano de Gian Marco Griffi. Tradukita el la itala de Christophe Mileschi. Gallimard. (2024). Prezo : 25 eŭroj.



Vivotelefono : ne maltrafu vian lastan alvokon ! de Anne K G

Mi skribas por forgesi la malgajecon, ĉar la larmoj estas pli beletaj, kiam ili havas la koloron de la inko.

Mi nomiĝas Sébastien, mi estas dudek sep jara, mi havas laboron, kiu plaĉas al mi, kaj en mia ama vivo malstabilecon plene akceptitan. Unuvorte, mi ŝatas mian vivon ! Fakte, por esti preciza, mi ankoraŭ multe ŝatis ĝin antaŭ nelonge.

Ĉio komencis elnormaliĝi proksimume antaŭ du monatoj, kiam por mia naskiĝtago mia patrino decidis donaci al mi vivotelefonon. Mi revidas ŝin stamfi, dum ŝi atendis, ke mi elpakas ŝian donacon, konvinkita, ke mi ĝojegos malkovrante ĝin. Tio ne okazis. Mia konsternita vizaĝo puŝis ŝin tiam al disvolvo de argumentaro, kiu ripetis vorton post vorto la plej grandajn reklamkampanjojn de tiu aparato. Ŝi finis sian deklamadon per memelpensita riproĉadmono.

--Seb, vi planas vian tutan vivon en via telefono ! Do kial ĝi ne utilis ankaŭ por via morto ?

Mi nenion respondis. Mi ne sukcesis elekti inter ĝentila « Dankon » kaj « Kio okazis al vi ? Vi estas tute freneza ! », pli sincera, sed kiu povus estigi konflikton.

Por ke vi pli bone komprenu, lasu min klarigi al vi la koncepton de la vivotelefono : kiel ĝia nomo indikas tion, ĝi estas unue telefono, sed ĝi estas la sola, kiu havas funkcion aparte mortigan, ĉar ĝi anoncas al la posedanto la daton en kiu li mortos per telefonalvoko tridek tagojn antaŭ la fatala dato !

Neniu ekzakte scias, kiel tio funkcias, ĉar ĝia kreinto, J. D. Louis, restis ege malpreciza pri la temo, kiam li lanĉis sian eksterordinaran aparaton. Krome, tiom enorma estis la debato kaŭzita de ĝia kreado, ke ne multaj homoj starigis al si la demandon. Por iuj la vivotelefono estis friponaĵo, por la aliaj ĝi havis diecon.

Tamen la sukceso estis tuja. Rapidege montriĝis, ke la komerca promeso tute plenumiĝis. Ĉie el la tuta mondo alvenis miloj da atestoj por danki J. D. Louis pro tio, ke li donis al ili tempon por serene adiaŭi al sia proksimulo, ĵus forpasinta.

Koncerne min, mi konfesas, ke mi observis de malproksime tiun ciferecan revolucion. Tiam mi jam opiniis malutila ekscii la daton de sia morto, antaŭ ol ĝi frapas vin. Kial perturbi siajn lastajn momentojn demandante sin, kiel oni mortos. Plej bone estas profiti, ĉu ne ?

La problemo estas, ke frue aŭ malfrue ne plu eblas ludi la epikuranon kun vivotelefono en la poŝo ! Mi komprenis tion antaŭ tridek tagoj, kiam meze de kunveno la mia ekfunkciis kaj ekelsendis sian fatalan sonoradon kun tiuj monde famaj paroloj : « Vivotelefono : ne maltrafu vian lastan alvokon ! »

Tiam mi ne reagis. Nur vidante miajn kolegojn senmoviĝi kaj rigardi min kun afliktita mieno mi fine komprenis, ke ili jam konsideris min prokrastoĝuanta mortulo.

-- Ĉu vi ne respondas ? Demandis min tiam Jean-Pierre Gibote, mia estro.

-- Mi ne tute kredas je ĉio ĉi ! Ekklarigis mi.

-- Necesas respondi, Sébastien ! Interrompis min mia estro. Tio estas grava por ni ĉiuj, vi komprenas ! Por vi, evidente, sed oni ne devas forgesi la entreprenon ! Se mi devas anstataŭi vin, mi ne havos tro da unu monato.

Ĉar la sonorado plu agredis miajn timpanojn, mi fine malkroĉis la telefonon.

-- Sinjoro Sébastien Marçon ?

-- Mi mem.

-- Mi estas Eve21 el la vivo-alarmservo. Mi bedaŭras anonci al vi, ke via vivo finiĝos post unu monato. Ĉu vi havas demandojn ?

-- Ne.

-- Mi anticipas kondolencas vin kaj viajn proksimulojn, kaj invitas vin malkovri niajn funebrajn pakaĵojn en nia retejo. Agrablan tagon.

Eve21 tuj reĉroĉis la telefonon. En la horkvarono, kiu sekvis, Jean-Pierre petis de mi, ke mi sekvu lin en lian oficejon por klarigi al mi, ke pli bone estos, se mi ne revenos labori la postajn tagojn por ne subfosi la spiritostaton de miaj kolegoj.

Ĉar bona novaĵo neniam alvenas sola, mi ricevis samvespere alvokon de mia posedanto, kiu volis informi min pri sia deziro organizi vizitojn de mia apartamento jam ekde la morgaŭo. Li bedaŭris la situacion, kiu lasis al li nur unu monaton por trovi novan luprenanton.

Kiel li sciis ? Nenia ideo, sed la informo disvastiĝis, ĉar Maria, la junulino, kun kiu mi eliris de tri semajnoj ankaŭ sendis al mi tekstmesaĝon :



« Mi ŝatintus havi pli da tempo kun vi. Ripozu en paco. »

La finofaran baton donis al mi mia patrino alvenante kun multaj teksaĵaj specimenoj, por ke mi povu elekti la koloron de la remburaĵo de mia ĉerko. Mi bezonis plurajn horojn por sukcesi liberigi min de mia patrino, sed nur kelkajn sekundojn por forĵeti mian vivotelefonon en la rubujon, post ŝia foriro.

Du tagojn poste, mi foriris el mia hejmo por fari la plej grandan veton en mia vivo : ne morti en la antaŭvidita dato. Mia strategio estis simpla : kaŝi min sola en blanka zono, malproksima de ĉia homo aŭ de ĉio, kio povus montriĝi danĝera al mia postvivo.

Nun plu restas nur kvin minutoj pacienci por fine transpasi la limdaton, kiun difinis al mi Eve21. Mi fine povos forlasi tiun kabanon perditan meze de la arbaro kaj rekomenci mian vivon.

Fulminformo :

La J.D. Louis Telecom kompanio ĵus anoncis la antaŭtempan forpason de sia fondinto dum aviadila akcidento.

La unuaj konstatoj supozigas, ke li perdis la kontrolon de sia dusidloka aviadilo. Laŭ la oficiala sciigo la fama inventinto de la vivotelefono ne estis informita de sia tuja morto. La entrepreno devas do urĝe administri lian heredon.

La ironio faras, ke estas alia viktimo de tiu akcidento, sinjoro Sébastien Marçon, kiu estis posedanto de vivotelefono. Li troviĝis en la kabano, sur kiun la aviadilo kraŝis.

Tiun novelon esperantigis el la franca Jean-Mary Simonet



Insulo de Fazanoj

Kiel ĉiujare, tiu hispana insulo reĝas franca la 1an de Aŭgusto.

Malgraŭ sia nomo ĝi ne superfluas per sovaĝaj kokinoj. Oni trovas ĉi tie nenian vivsignon krom kelkaj kojpoj kaj palmipedoj.

Estante apenaŭ 130 metrojn longa, 15 metrojn larĝa kaj situante meze de la rivero Bidassoa, natura landlimo inter Francio kaj Hispanio, la insulo de Fazanoj estas eksterordinara terpeco. Je kelkaj kilometroj de Hendaye (Atlantikaj Pireneoj), tiu teritorio estas kunsuvereneco, tio signifas, ke pluraj ŝtatoj alternative ekzercas suverenecon dum 6 monatoj.



Ekde la 1a de Februaro ĝis la 31a de Julio, ĝi estas hispana, de la 1a de Aŭgusto ĝis la 31a de Januaro, ĝi reĝas franca. La traktato de Pireneoj estas la origino de tiu specialaĵo, ununura en la mondo. Subskribita en 1659, post 24 kunvenoj (pro tio la kromnomo insulo de la Konferenco), tiu traktato ĉesigis jardekojn da militoj inter Habsburgoj kaj Burbonoj, difinis la nunajn landlimojn inter Francio kaj Hispanio kaj konkludis la geedziĝon inter la hispana infanto, Maria Terezo de Aŭstrio kaj Ludoviko la dekkvara, kiu okazos la sekvantan jaron. Necesis atendi la traktaton de Bajono en 1856, por ke stariĝu kuna teritoria suvereneco. Tradicio, kiu pludaŭras ankoraŭ hodiaŭ.

La verkisto Loti estis tie vicreĝo.



Francflanke, la insulo povas esti observata de la bordo de Jonceaux, sur la golfetvojo. Sed ne esperu elboatiĝi ĉi tie, ĝia aliro estas malpermesita, krom al la municipaj dungitoj de Hendaye kaj de Irun ŝarĝitaj de ĝia bontenado. La insulo estas vizitata je ĉiu transdono de aŭtoritato, kiam okazas oficiala ceremonio kun la militistoj kaj reprezentantoj de la du landoj. Tiu ceremonio okazas ekde 2012 antaŭ la steleo memoriganta la traktaton de Pireneoj. Antaŭe la klopodoj efektiviĝis per simpla poŝtaĵo.

Okaze de tiu 1a de Februaro, la kapitano de la ŝiparo de Sankta Sebastiano iĝos la insula vicreĝo, titolo nur honoriga. Post 6 monatoj, la 1an de Aŭgusto, la titolo denove revenos al la delegito pri maro kaj marbordo de la departementoj « Landes kaj Atlantikaj Pireneoj », funkcio, kiun la verkisto Pierre Loti okupis dufoje inter 1892 kaj 1898.

Artikolo eltirita el la ĵurnalo Le Figaro kaj esperantigita de Jeannine Layseman.



La kanabo



La ekosistemo portata de la societo « Chanvre Aère » bazita en Bléré trideko da kilometroj for de Tours kaj specialiĝinta en transformado de la industria kanabo, eniras en aktivan fazon en 2025. La gravaĵo estas la plantado, venontan jaron, de pluraj centoj da hektaroj de kanabo fare de agrokulturaj ekspluatistoj de Turlando post eksperimentado kondukita en 2023 kaj 2024.

Forvia antaŭvidas duobliĝi post tri jaroj la nombron de veturiloj ekipitaj per biofontaj, plastaj ŝraŭbigiloj integrantaj fibrojn de la industria kanabo.

La kanabo, tiu planto, kiu markstrekas ĉiujn ĉelojn de la ekologia transiro.

Tria kanaba produktisto en la mondo, ĉu Francio sidus sur amaso da verda oro ? Indiferenta al la sekeco, tiu planto havas multoblajn aplikojn (de la konstruo al la teksaĵo, inkluzive la nutraĵon, la kosmetikaĵojn aŭ la plasttransformon), anoncas sensacian resupreniron salutitan eĉ de la instancoj de la Unuiĝintaj Nacioj, kiuj kuraĝigas ĝian kultivadon.

De Nathalie Jourdan 27 01 2023, ĝisdatigita la 18an 12 2024.

En 2024 Charles Morel kaj Vincent Césario kreskigis 10 hektarojn da industria kanabo en Bréhémont. Testkultivado antaŭ ol alkomercigi la planton en betonon, meblojn kaj aliajn uzadojn.

Industria kanabo denove kreskas en Bréhémont sur unu deko da hektaroj. La luara vilaĝo proksime de Chinon estis kanaba ĉefurbo je la

18a kaj 19a jarcentoj, plenaj pakegoj atingis la uzinojn de Angêvo aŭ de Rochefort per Luaro por elfari ŝnurojn kaj velojn.

Artikolo el La Tribune esperantigita de Jeannine Layseman



Fagopiraj blinoj kun spinacoj

Preparado :20 mn

Ripozo : 30mn por la pasto

Kuirado : 20mn

Ingrediencoj

Por 15 blinoj

4 ovoj

170 g da kuiritaj spinacoj bone degutigitaj

120 g da fagopira faruno

½ saketo da bakpulvoro

125 g da raspita parmezano

1 citrono

Salo kaj pipro, olivoleo.

En granda salatujo, kirlu la ovojn kun la hakitaj spinacoj. Almiksu la farunon kaj la bakpulvoron. Finfine aldonu la parmezanon.

Elprenu la citronŝelon poste tranĉu la citronon en 2 partojn kaj elpremu ĝin. Aldonu la sukon kaj la ŝelon al la pasto. Salu kaj pipru. Ripozigu la paston dum 30 mn sub pura viŝtuko.

Varmigu krespilon. Kiam ĝi estas varmega, alverŝu etajn ĉerpilojn da pasto. Lasu la unuan flankon kuiriĝi 2 aŭ 3 mn antaŭ ol renversi ilin. Kuiru tiel ĉiujn blinojn.

Mi ne havas krespilon, do mi uzas paton kaj mi devas meti iomete da oleo por kuiri la blinojn.

Tiun recepton proponis al ni Jeannine Layseman.

